*novembro 1966*

# NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio*
*„La Estonto Estas Nia"* - *31-a jara, n-ro 11*

*Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.*

*Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.*

## INAŬGURO ESPERANTOMONUMENTO EN LEEUWARDEN



*La Esperanto-monumento en Leeuwarden.*

Je sabato, la 24a de septembro 1966, precize je la 16-a horo, granda societo kunvenis en la D-ro Zamenhofparko en Leeuwarden, kie, meze sur vasta gazono, estis envolvita en verda lano inaŭgurota skulptaĵo. En la fono la Esperanto-flago sur standardo.

La prezidantino de la Frisa Esperantista Rondo, f-ino W. Steffering, bonvenigis la aŭtoritatulojn: la reprezentanton de la pola ambasadoro kun edzino kaj filino, la deputiton de la Provinca Estraro por Kulturaj Aferoj, la urbestron kun edzino, du skabenoj, diversajn komunumajn konsilantojn, la urban sekretarion, la komisarion de polico, direktoron de la Frisa Akademio, estraranojn de la subveciintaj privataj fondumoj, la urban arĥitekton, la direktoron de la Urbaj Ĝardenoj, la prezidanton de la Ligo de Frisaj Artistoj, la direktoron de la Princessehof-muzeon, la direktorinon de la Centra Oficejo de U.E.A., la prezidanton de L.E.E.N., kun edzino, k.a.

Plue la prezidantino klarigis la intencon de la 3 metrojn alta moderna abstrakta figuro el kupro, kiun kreis la frisa skulptisto Tjeerd Visser de Duurswoude. En sia ronda formo ĝi esprimas la ĉiam daŭrantan lukton por efektivigo de idealo (ĉi-kaze tiu de Esperanto) kaj per la pinta supra formo la linion alten de la evoluo: el la ĥaoso al certa celo, al la unueco. Cetere la skulptaĵo iom similas junan birdon, kiu obstine volas flugante atingi forajn celojn. Ĝi portas la Esperanto-ideon, kiu nepre akompanu la rapidegantajn



*Antaŭ la monumento: la skulptisto Tjeerd Visser (duone), la urbestro W. Harmsma, la prezidantino de F.E.R., f-ino W. Steffering, s-ro G. J. Degenkamp kaj s-ro W. Rolski, la unua legacio-sekretario de Pollando.*

trajnojn, aŭtomobilojn, aŭtobusojn, aeroplanojn. Ĉi tiuj ja realigas internaciajn kunligojn, sed ne povas efektivigi la *profundajn interhomajn* kontaktojn trans ĉiujn limojn. Por tio taŭgas ĝuste Esperanto.
La prezidantino cetere atentigis pri la internacia vojeto al la monumento: naturŝtonoj, donacoj de Esperantistoj el diversaj landoj kaj mondpartoj, markas ĝin.
La urbestro post simpatia paroladeto malkovris - kun helpo de la du ĉarmaj infanoj de la skulptisto - la skulptaĵon, dirante en Esperanto, ke li ĝojas povi inaŭguri monumenton en ĉeesto de tiom multaj Esperantistoj.
La unua legacio-sekretario de Pollando, s-ro W. Rolski, metis poste florbukedon en la polaj koloroj: ruĝa-blanka, sur la monumenton.
La solenaĵo finiĝis per la kantado de la Espero, akompanata de trombonisto de la polica Orkestro de Leeuwarden.
En Hotelo „De Klanderij" okazis poste, pro la inaŭguro kaj la 40-jara ekzistado de F.E.R., multvizitata akceptado, dum kiu paroladis s-ro H. Kervers, nome de la ĉefestraro de L.E.E.N., transdonante koverton, f-ino M. H. Vermaas, nome de U.E.A., s-ro P. Hendriks kiel kunfondinto kaj antaŭmilita motoro de F.E.R., s-ro Niemijer el Sneek, kiu donacis flagon kaj sonbendon, f-ino B. Hovinga nome de la Groningenaj „najbaroj", donacante koverton, s-ro Inĝ. Kurt Meyer nome de la amika grupo el Bremen, kiu transdonis artobjekton, kaj fine la skulptisto. La sekcio Hago de L.E.E.N. donacis florojn kaj s-ino J. v.d. Meulen-van Harten venis nome de la grupo de Krommenie kun flago.
Ĉeestis la akceptadon ankaŭ la pola aŭtoritatulo, la urbestro, la komisario de polico k.a.
La vespermanĝo en la sama hotelo estis bonega kaj donis okazon por tre vigla babilado.
Dum la festvespero ludis la Fries Kamer-Orkest (Frisa Ĉambro-Orkestro). Pri ĝi la aŭskultantaro estis entuziasma, same kiel pri la brila prelego de s-ro Andreo Cseh, la famkonata kursgvidanto rumandevena, kiu „liveris" per siaj grandaj kursoj en 1931 multajn anojn al la Rondo. Same elokventa, sprita kaj energia li montris sin kiel antaŭ 35 jaroj!
Paroladis ankaŭ s-ro S. Stuit el Arras, Francujo, s-ro G. J. Degenkamp el Amsterdamo kaj s-ro M. Koopmans el Groningen.
F-ino Y. Weidema, la sekretariino de F.E.R., laŭtlegis la multegajn gratulojn el en- kaj eksterlando.



# ASOCIAJ INFORMOJ

Ĉefestrarkunveno de I—X—1966 en Amersfoort. Ne ĉeestis: s-ro Boersma (pro ferioj), s-ro Calado (sen sciigo). S-ro Beekhuysen - pro profesia laboro en la mateno - venis posttagmeze.
*I.a.* estas pritraktitaj:

1e. Anstataŭado de eksiĝinta s-ino Woessink-Boet (s-ro Boersma pretas transpreni portempe la taskon de „Informado", s-ino Woessink daŭrigos la reprezenton ĉe „Nationale Vrouwenraad"). Dum la venonta jarkunveno oni elektos novan funkciul(in)on.
2e. Ekzamenkomitato: la ĝen. sekretariino petos informojn pri eventualaj ŝanĝoj en la „Interkonsento" al s-ino Burgler, la prezidantino de la Ekz. Komitato.
3e. La likvidiĝo de sekcio Hoogezand.
4e. Membreco de diversaj ne-esperanto-unuiĝoj (ekz. Nationale Vrouwenraad, Nederland in den Vreemde).
5e. Rilato L.E.E.N.-UEA (la propagando por varbado de membroj kaj delegitoj, tasko de s-ro Calado).
6e. Teatra servo (s-ro Beekhuysen verkos artikoleton por N.E.).
7e. Redaktoro N.E. (s-ro Kervers pritraktos la ĝis nun negativan rezulton trovi alian redaktoron kun s-ro Groendijk kaj klopodos trovi kune kun li solvon).
8e. Protokolado de jarkunvenoj (s-ro Kervers havas proponon ŝanĝi la ne kontentigan metodon de lastaj jaroj).
9e. Leteroj al V.A.R.A., s-ro Punt kaj F.L.E. (esprimoj de bedaŭroj pri la ĉesigo de la Esp. radio-elsendoj de V.A.R.A.).

Venonta ĉefestrarkunveno: 5-2-1967 en Amersfoort.

---

La varia programo, gvidata de f-ino A. A. Laverman, enhavis i.a. la divenon de titoloj de libroj, deklamado de s-ro W. Böttcher ĉe desegnaĵoj de Dolfa Bartoŝik el Praha, kaj komuna kantado. Pianisto invitis de tempo al tempo al dancado.
Honoraj gastoj estis gesroj. Isbrucker-Dirksen el Hago (s-ino Isbrucker propagandparoladis en 1926 en Leeuwarden.
Unua sekvo: komenca kurso gvidata de s-ro Hendriks, dua sekvo: Frisa E. Rondo).
Ĉeestis plue gastoj el Francujo, Kanado, Germanujo kaj Kongo.
Dum la dimanĉo okazis boatekskurso sur la frisaj lagoj, ankaŭ bonege sukcesinta.
Lunde s-ro S. Stuit el Arras transdonis nome de la Franca Unuiĝo de Esperantistoj al la urbestro en la Urbodomo la „Dian Komedion" de Dante en Esperanto-traduko.

**W. Steffering.**

**Nia biblioteko.**

Certe multaj el vi iam diris: „Kie estas nun nia biblioteko kaj kiamaniere mi povos uzi ĝin?".
Mi klopodos klarigi al vi la situacion.
Antaŭ proks. du jaroj ni decidis pruntedoni nian bibliotekon al la universitata biblioteko en Amsterdam. Nun ĝi estas parto de granda, publika biblioteko, kiu estas aranĝata kaj gvidata laŭ modernaj, sciencaj metodoj.
La estraro de la U.B. promesis eldoni specialan katalogon de ĉiuj Esperantaj libroj de la libraro, do ankaŭ de la propraĵo de la U.B. mem.
Plue ĉiuj niaj membroj povos uzi la librojn laŭ la reguloj kiuj validas por ĉiu leganto.
Estas diversaj kaŭzoj por la prokrasto de tiu ĉi promeso:

1. De tempo al tempo oni ankoraŭ sendas librojn al la biblioteko kaj oni ŝatas ankaŭ ties titolojn publikigi en la katalogo.
2. Kvankam laboras en la U.B. proks. 125 personoj, oni tamen ĉiam havas tro multe da laboro por pretigi ĉion.
3. Oni estas konstruanta novan konstruaĵon por la U.B. tuj apud la malnova, kiu de tempo al tempo preskaŭ ruiniĝas pro malforto de la muroj kaj la plankoj. Sed por tiu transloĝiĝo de-

---

*Pro abundo da materialo por „N.E." la redaktoro petas insiste radakti ensendotajn artikolojn, informojn k.t.p. kiel eble plej koncize. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto. Manuskriptoj por iu numero de „N.E." atingu la redaktoron antaŭ la 10-a de la antaŭa monato.*

*La Redaktoro.*

nove oni bezonas multe da tempo kaj faras multe da laboro.

Do bonvolu kviete atendi: La afero progresas kaj se ĝi estos finpreparita, vi denove povos disponi pri nia propra biblioteko kaj pri tiu de la U.B.

J. R. Janssen.

**Ĉu vi jam . . . . ?**

Pere de la konata kaj bonega broŝuro „Fundamentele feiten over de internationale taal Esperanto" ni havas la eblon fari propagandon por nia lingvo.
Kiugrade la diversaj sekcioj kaptis la okazon por vere fari tion?
Jen la listo pri la ĝis 1-10-1966 menditaj ekzempleroj. Ĉu tio sufiĉas? Juĝu mem.

Sekcioj:

| | |
|---|---|
| Alkmaar | 20 ekzempleroj |
| Almelo | 75 ekzempleroj |
| Amsterdam | 15 ekzempleroj |
| Arnhem | 100 ekzempleroj |
| Boskoop | 5 ekzempleroj |
| Deventer | 75 ekzempleroj |
| Groningen | 110 ekzempleroj |
| 's-Gravenhage | 30 ekzempleroj |
| Hilversum | 50 ekzempleroj |
| Leeuwarden | 50 ekzempleroj |
| Leiden (Pacen) | 10 ekzempleroj |
| Rotterdam (La Espero) | 50 ekzempleroj |
| Utrecht | 30 ekzempleroj |
| Zeist | 50 ekzempleroj |
| | 670 ekzempleroj |
| Eindhoven Esp. Klubo | 50 ekzempleroj |
| | 720 ekzempleroj |
| ĝen. membroj kaj privataj mendoj de membroj | 45 ekzempleroj |
| ĉefestraro | 44 ekzempleroj |
| Entute | 809 ekzempleroj |

La ĝenerala kasistino petas tiujn sekciojn kiuj ĝis nun ankoraŭ ne pagis la menditajn ekzemplerojn, ĝirpagu en la poŝtkonton 34563 Santpoort-Zuid.

La ĝen. sekretariino.

# EL LA SEKCIOJ.

**La „Norda Stelo"-kunveno sur Tekselo.**

Dimanĉon, la 18-an de septembro 1966, la esperantista laborkomitato por la norda parto de Nordholando „La Norda Stelo" organizis agrablan tagon sur Tekselo. Oni vizitis la Zamenhof-monumenton en Den Burg, kie s-ro O. Hoekstra el Schoorl paroladis, kaj florkrono estis pendigata.
Post kaftrinkado en Catharina-hoeve oni promenis tra la arbaro al la muzeo kaj admiris belegajn akvobestojn, prahistoriaĵojn kaj vivantajn fokojn. Bela aŭtuna vetero helpis ĝui plej agrablan tagon. Ĉeestis ankaŭ kelkaj infanoj.

## GAJA JUBILEO FESTO EN ZEIST

La sekcio Zeist de L.E.E.N. gaje festis sian jubilean feston okaze de sia 40-jara ekzisto. Jam antaŭ la 2-a posttagmeze sin kolektis gastoj en la salonoj de la konstruaĵo „Jonathan". En unu el ili la Zeistanoj organizis ekspozicion de libroj, gazetoj, faldfolioj ktp. Speciale rimarkinda estis la kolekto da gratuloj, kiujn la sekcio ricevis el diversaj partoj de la mondo. Ĉio estis arte aranĝita. Parto de la ekspozicio poste servis por malgranda elmontro en la fenestro de butiko en la Slotlaan.
Je la 3-a komenciĝis aŭtobusekskurso tra Zeist. La buso estis plenplena kaj ĉiuj partoprenantoj tre ŝatis la belajn parkojn kaj novajn kvartalojn, kiujn S-ro Slot montris al ili.
Nemirige, ke la partoprenantoj de tiu ĉi ekskurso post reveno en agrabla humoro sin miksis inter la aliaj festantoj, tiel ke la buterpanmanĝo ekzistanta el supo, simplaj pantranĉoj kaj kafo, estis konsumataj en amikeca sfero. Dum la manĝo la prezidanto, S-ro Slot, devis respondi al multaj gratulesprimoj kaj danki pro la ricevitaj donacoj.

Je la 7-a kaj duono la gastoj kolektiĝis en la teatra salono, kie la gejunuloj prezentis kelkajn skizojn, enstuditaj sub gvido de Gesroj Van Wijnen. La diversaj partoj estis interrompataj de kantoj de S-ino Ramona van Dalsen, akompanita de F-ino Schoonman el Hago, la Amersfoorta virina ĥoro kaj deklamado de F-ino Katrin Burger.
La sekcio Zeist povas rerigardi al bela evento, kiu certe estos nova instigo por la viglaj anoj.

**_ABONU ANKAŬ VI „HEROLDO DE ESPERANTO"_**
*Reprezentas: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.*

**Sekcio Leiden, „Pacen".**
*Sekr.: Hazenboslaan 24, Oegstgeest.*

La 29-an de aŭgusto subite mortis, 64 jara, nia membrino, F-ino E. H. M. Bernard, kiu dum multaj jaroj prizorgis la sekretariecon de nia societo.
Unu monaton poste je la 30-a de septembro nova bato trafis nian klubon per la subita morto de nia sekretario, S-ro J. C. van Gijsel, kiu atingis la aĝon de 72 jaroj. Ili ambaŭ ripozu en paco.
S-ro Valkenburg ek de la unua de oktobro prizorgos la sekretariecon.

**Sekcio „Merkurio", Rotterdam.**

P. A. van Boven †

Je la 30-a de septembro mortis nia membro P. A. van Boven, honora membro de „Merkurio". Li havis 93 jarojn. Post sia pensiiĝo li fariĝis esperantisto. Tio okazis per la bonfama Nimega Skriba Kurso. Tuj Esperanto okupis grandan lokon en la koro de amiko Van Boven. Li aliĝis al nia societo kaj montris sin fidela membro.
Ĝis alta aĝo li konservis sian saĝon kaj prudenton kaj kun granda intereso li sekvis la laboron de la samideanoj. Ni konservas pri li bonan rememoron de fidela kunlaboranto kaj bonkora amiko. Li ripozu en paco.
Niajn kondolencojn al liaj infanoj kaj nepoj, kiuj perdis bonan patron kaj avon.

J. Calado.

**Turistaj informoj en Esperanto pri la muelilo̧j en Kinderdijk.**

La komunuma estraro de Nieuw-Lekkerland (Nieuw-Lekkerland = Nova lando de (la rivero) Lek) laŭ peto afable sendis al mi esperantlingvan stencilaĵon de du paĝoj pri la fama vico de 19 muelilo̧j en Kinderdijk, vilaĝo najbara al Nieuw-Lekkerland (Z.-H.).



Ni citu la finan frazon: „Per ĉi-supra eksplikado ni esperebla iom komprenigis la pumpadon kaj la aranĝon de la akvo-muelilo̧j, pri kiuj tre fieras la komunumo kiu instigas vin ĉiujn, ke vi venu vizite al la unika kaj bela mueleja pejzaĝo de Nieuw-Lekkerland".
Esperantistoj kiuj foje intencas fari interesan ekskurson kun eksterlandaj gesamideanoj, nepre kaptu ĉi tiun okazon.

H. G.

**ĜENERALA NEDERLANDA ESPERANTO-EKZAMENKOMITATO.**
**Ekzamenoj 1966, okazintaj en Amersfoort je la 28-a de majo 1966-a.**

**Sukcesis por S:**

S-ino P. E. v.d. Werff-Geldmaker, Rotterdam.
S-ro G. W. Duivis, Heemstede.
S-ro G. F. Cool, S-ino J. T. Koopmans-Schotanus, Leiden.
F-ino M. de Kunéry-Malinies, Den Haag

**por M:**

S-ino M. v.d. Brink-Sonnenberg, Apeldoorn.
F-ino R. M. B. Koopmans, Leiden.
S-ino A. M. Demmendaal-Op den Brouw, Rotterdam.
S-ro M. Stoop, Amsterdam.
S-ino A. Noordewier-Jagtenberg, Leusden.
S-ro P. Bos, S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, S-ro J. O. de Kat, Den Haag
S-ino B. Muizelaar-Borger, S-ino A. v.d. Pol-v.d. Berg, Haarlem.
S-ro W. Nieuwenhuizen, Bunnik.
S-ro W. Baris, Schiedam.

**por E:**

S-ino H. D. Beyne-v. Os, S-ro R. Wassenaar, Leiden.
S-ino M. A. v. d. Kooy-Waal, S-ino C. M. H. Schoonman, S-ino T. v. Woerden, Den Haag.
S-ino K. L. Munniksma-Bollen, A'-dam.
F-ino N. A. Boersma, Leeuwarden.
S-ro J. W. Katoen, Rotterdam.
S-ro J. H. A. le Blansch, Schiedam.
S-ro R. Moerbeek, Emmeloord.
S-ro R. v. Hees, Arnhem.
S-ro J. F. Peters, Velp.

# 52-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

**TEL AVIV, 2—9 AŬGUSTO 1967**

*Alta Protektanto:* Zalman Ŝolar, Ŝtatprezidanto de Israelo.
*Konstanta Adreso:* Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

**OFICIALA KOMUNIKO**

N. 1.

*Kotizoj.* La aliĝkotizoj validaj ĝis la 31-a de dec. 1966 estas jenaj

| | |
|---|---|
| Kongresano | 70,— ned. gld. |
| Junul. ĝis. 20 jr. | 21,— ned. gld. |
| Edz(in)o de kongresano | 35,— ned. gld. |
| Univ. Stud. ĝis 30 jr. | 34,— ned. gld. |
| Blindulo | 27,50 ned. gld. |

Rabatoj:

a) Individua membro de UEA, kiu ricevas la Jarlibron kaj la Revuon „Esperanto", rajtas rabaton de 20,— ned.
b) Individua membro de UEA, kiu ricevas nur la Jarlibron, rajtas rabaton de 10,— ned. gld.; gld.;
c) Edz(in)o de individua membro (de ambaŭ kategorioj) rajtas rabaton de 10,— ned. gld.

Kongresano, kiu pagas la plenan kotizon (70,— gld.) ricevas la revuon „Esperanto dum la tuta kongresa jaro.

*Unua Bulteno.* La 4-paĝa grandformata Unua Bulteno kaj la Aliĝilo estas ricevеblaj senpage ĉe la Landaj Asocioj kaj Ĉefdelegitoj de UEA, ĉe la Kongresaj Perantoj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

*Glumarko.* Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela kolora glumarko eldonita okaze de la 52-a U.K. Prezo: 0,50 ned. gld. (2,— st.) por 10-glumarka folio.

G. G. Pompilio - K.K.S.

**Esperanto en Komerco** - kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm 2,—, ekde 10 libroj gm. 1,35.
Esperanto - Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.

**Eksperimenta Esperanto-Kurso en la Muelejo de Metilernantoj.**

Same kiel pasintjare (vidu „N.E." de marto 1966, p. 28) oni intencas ankaŭ ĉi-jare okazigi Esperanto-kurson en unu el la muelejoj de Metilernantoj, nome en la ĉefmuelejo Piot, 60 km. sude de Châteauroux (Francujo).
Oni serĉas tiucele kompetentajn, ne tro maljunajn instruistojn pri Esperanto.
Bonvolu skribi al: S-ro H. Bakker, estrarano de TEJO pri NEJOj (Ne-Esperantistaj Junularaj Organizoj), Kastelenstraat 231 II, Amsterdam-Z.

**TEJO - „Seminario por Gvidantoj", Bruselo 3-10/1/1967.**

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo iniciatis Praktikan Kurson „Seminario por Gvidantoj", ĉi-foje ankaŭ destinita por ne-TEJO-anoj.
Dato: 3-10 jan. 1967; loko: Bruselo; lingvoj: franca, nederlanda, esperanto, angla, kun konsekutiva interpretado; kotizo: 150 Bfr.; loĝkostoj: 600 Bfr.
Faldfolio kun ĉiuj informoj, provizora programo kaj aliĝilo havebla ĉe: H. Bakker, Kastelenstraat 231 II, Amsterdam-Z.

## SEMAJNFINO DE N.E.J.

La semajnfinon de Nederlanda Esperanta Junularo, kiu okazis la 17-an kaj 18-an de septembro en Roden (Dr.) partoprenis 16 gejunuloj.
Sabate je la 16-a horo proksimume ni alvenis. La por la vespero planita prelego ne povis okazi pro subita malsaniĝo de la prelegonto, d-ro V. Sadler. Anstataŭe la patro de la junulargastejo donis al ni kelkajn taskojn: i.a. ni devis fari ion el la naturo kaj teatraĵon en Esperanto. Poste ni ludis ankoraŭ kelkajn ludojn.
Dimanĉmatene ni promenis kaj vizitis dolmenon. Posttagmeze ni jam frue veturis al Leek (Gr.), kie ni vizitis la veturilmuzeon en la iama biendomo „Nienoord". Estas tre interese vidi tiom da diversaj kaleŝoj.
Ni revidis multajn malnovajn konatojn, kaj eĉ pli da novaj geamikoj - anoj kaj ne-anoj de NEJ - honoris nin per sia partopreno. Ĉiujn mi petas jam nun rezervi liberajn tagojn je la 7-a kaj 8-a de januaro, kiam ni denove aranĝos semajnfinon, do tuj post la deka Internacia Seminaro de GEJ. Krome konkretiĝas la

# Aliĝilo

2-9 VIII 1967

**52-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO,**
Tel Aviv, Israelo

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.
Banko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam.
Poŝtĉekkonto de la Kongreso: 627337
Klara skribo estas grava helpo por la administracio.
**Aliĝiloj ne klare skribitaj restos netraktitaj.**

| | |
|---|---|
| Mi aliĝas al la kongreso laŭ la kondiĉoj sur la dorsa flanko kaj laŭ la jena specifo sendas la pagon kune kun la aliĝilo al: ........................ | Kotizo . . . . . ........................ |
| ........................ | Literatura Kaso . ........................ |
| per poŝtmandato/poŝtĉekkonto | Blindula Kaso . . ........................ |
| banko/bankĉeko | Adopta Kaso . . ........................ |
| | Adoptaj Gepatroj (n.gld. 30) ........................ |
| | Kredito/Ŝparmono ........................ |
| | Entute . . . ........................ |

Familia Nomo, S-ro, S-ino, F-ino (**nepre** forstreku du) ........................

........................

Antaŭnomo ........................
Profesio (en Esperanto - Nur por statistiko) ........................
Strato kaj numero ........................
Urbo (en latinaj literoj) ........................
Provinco (kie necesas por la poŝto) ........................
Lando (en Esperanto) ........................
Naskiĝojaro (Nur por statistiko — La informo restas konfidenca) ........................
Antaŭnomo de edz(in)o, kiu aliĝas samtempe (laŭ aldonita aparta aliĝilo) ........................

........................

Dato de tiu ĉi aliĝilo ....../....../...... Subskribo ........................
**Aliĝoj estas akceptataj ĝis la 30-a de junio 1967**
Por uzo de la administracio

| Pago ricevita | Kongreskarto sendita | Statistikita | 2-a Bulteno sendita | K.L. sendita |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

14843

| KONGRESKOTIZOJ | Ĝis 31.12.66 n.gld. | isr. l. | Ĝis 31.3.67 n.gld. | isr. l. | Ĝis 30.6.67 n.gld. | isr. l. |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Kongresano | 70.— | 58.— | 77.— | 64.— | 85.— | 70.— |
| Edz(in)o de kongresano | 35.— | 29.— | 38.50 | 32.— | 42.50 | 35.— |
| Junul(in)o ne pli ol 20-jara | 21.— | 17.— | 24.— | 19.— | 26.— | 21.— |
| Universitata Student(in)o de 20 ĝis 30-jara | 34.— | 28.— | 38.— | 32.— | 44.— | 36.— |
| Blindul(in)o | 27.50 | 23.— | 31.— | 26.— | 35.— | 29.— |

**Israelaj aliĝantoj** povas sendi la aliĝilon kaj pagi la koncernan kotizon al: 52-a Universala Kongreso de Esperanto, P.O. Box 1289, Tel Aviv. Banko Hadoar - Konto n. 48191 aŭ Bank-Leumi, Givatajin, Kikar-Noah, Konto n. 6392.

**Rabatoj:** 1) Individua membro de U.E.A., kiu ricevas la Jarlibron kaj la Revuon "Esperanto", **rajtas rabaton de 20,— ned.gld. (16,— isr.lir.);**

2) Individua membro de U.E.A., kiu ricevas nur la Jarlibron, **rajtas rabaton de 10,— ned.gld. (8,— isr.lir.);**

3) Edz(in)o de individua membro (de ambaŭ kategorioj) **rajtas rabaton de 10,— ned. gld. (8,— isr.lir.).**
La rabatoj ne validas por aliaj familianoj, gejunuloj, studentoj, blinduloj.

N.B.
Kongresano (ne edz-in-o kaj alia kategorio), kiu pagas la plenan kotizon, **ricevas la Revuon "Esperanto" dum la tuta kongresa jaro.**

**Studentoj:** La speciala tarifo por studentoj rilatas nur al **universitataj studentoj** kaj ĝi validas nur se kun la aliĝilo troviĝas atesto de la Universitato kun traduko en Esperanto.

**Blinduloj:** La speciala tarifo por blinduloj validas nur se kun la aliĝilo troviĝas atesto de okulkuracisto aŭ blindulorganizaĵo. Gvidanto de blindulo rajtas ne pagi la kotizon.

**INSTRUKCIOJ** pri aliĝo al la 52-a Universala Kongreso de Esperanto:

1. Ĉiu partoprenonto devas **nepre** plenigi apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon, uzu samformatan paperon.
2. Donu ĉiujn petitajn detalojn. Skribu klare, tajpe aŭ preslitere. Aliĝiloj ne klare skribitaj restos netrakitaj.
3. Sendu la aliĝilon kaj la pagon rekte al la U.K. aŭ al la landa peranto.
4. Pagu nepre al la sama instanco al kiu vi sendas la aliĝilon.
5. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la pago.
6. La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la kongreson. Se persono pagas aliĝkotizon por alia, antaŭvidu tion.
7. Se oni deziras sendi kun la aliĝkotizo monon por sia kredito ĉe la Kongreso, oni povas tion noti sur la aliĝilo.
8. Pagante por alia persono nepre klare sciigu la celon de la pago kaj skribu la kompletan adreson.
9. Kongresan karton oni ne rajtas fordoni, vendi aŭ interŝanĝi.
10. Ŝparmono por la vojaĝo al Tel Aviv estas daŭre akceptata de la C.O. Oni povas ĝin sendi kun la aliĝkotizo.



# SCIINDAĴOJ EL LA HISTORIO DE NIA ASOCIO (VIII)

Je la unua de aŭgusto 1936 estis starigita la fundumo Libro-Servo L.E.E.N., kiu en la posta jaro transprenis la restantan stokon de la likvidita Centra Esperanto-Librejo en Hago kaj dum multaj jaroj bonege kontribuis al la pliigo de la monrimedoj de la asocio. Estis eldonita alloga broŝuro „Wat nu?", kompilita el serio da artikoloj aperintaj en N.E. fare de s-ro P. Hendriks. Tiu eldonaĵo, pri kiu aperis en la posta jaro dua eldono, donis detalajn informojn pri L.E.E.N. kaj la internaciaj organizoj por novaj kursanoj kaj membroj. Krome la asocio eldonis propran modernan lernolibron, senpage kompilitan de s-ro W. Grolleman, en 3000 ekzempleroj. Alia eldonaĵo estis „Ponto al la Praktiko", kompilita de s-roj S. S. de Jong Dzn. kaj W. Feenstra, represo de artikolaro en la organo. S-ro F. Weeke iniciatis kaj gvidis sessemajnan intersekcian tradukkonkurson; poste li kompilis, gvidis kaj forsendis stencilitan prilingvan gazeton „La Studanto". Cirkulis inter la sekcioj por aranĝi ekspoziciojn la bonega enhavo de 6 propagandaj kestoj, kaj same servis al la propagando aĉetita kopio de propaganda filmo, farita en Francujo, titolita „Antaŭen". Intertempe jam dum kelkaj jaroj la redaktado de la gazeto estis en la manoj de s-ro P. Hendriks, kiu ofte plibeligis la enhavon. Je la dua de oktobro 1937 la nederlandaj societoj, kunlabore kun diversaj porinstruistaj organizoj, fondis la oficejon „Esperanto en la lernejoj", kies unua direktoro fariĝis s-ro P. W. Baas.
Jam la 5-an de novembro 1938 tiu instanco aranĝis grandskalan multvizititan nacian kongreson en Hago, kie diversaj aŭtoritatuloj pledis por enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj kiu ricevis vastan raportaron en la gazetaro. S-ro Grolleman transprenis la prezidantecon de la asocio, poste ankaŭ la redaktadon de la organo.
Tamen la malbonaj antaŭmilitaj ekonomiaj cirkonstancoj, akcentitaj pro la minacanta mondmilito, kaŭzis ke iom post iom ekregis apatio en la asocio. Pro senlaboreco kaj aliaj kialoj multaj membroj eksiĝis, kvankam la grupoj daŭrigis la propagandon kaj la aranĝadon de kursoj. En 1938 L.E.E.N. nombris ankoraŭ 47 sekciojn kun 1210 gemembroj; en 1939 tiuj ciferoj estis resp. 39 kaj 993. En tiu jaro, en la monato septembro, nia registaro ordonis la mobilizadon: diversaj aktivuloj, i.a. s-ro Baas, devis soldatservi. En la oficejo anstataŭis lin provizore s-ro P. de Jong, sed la postaj okazaĵoj paralizis la agadon. Ekbrulis la milito en 1940; en la aŭtuno la asocio devis transdoni siajn bilancon kaj jarkontojn al la okupantaj naziistoj. Ili devigis L.E.E.N., ĝiajn sekciojn kaj aliajn instancojn ĉesi la poresperantan agadon, komence de la 23-a de marto 1941. La mono estis ŝtelita, la posedaĵoj konfiskitaj kaj detruitaj.

*(fino)* **P. M. Mabesoone.**

*Provizore tiu ĉi estis la lasta parto de la serio „Sciindaĵoj el la historio de nia asocio". Eble post kelke da tempo s-ro Mabesoone daŭrigos la serion, pritraktante la postmilitan periodon.*
*La antaŭaj partoj aperis sinsekve en „N.E." (1966) de marto, aprilo, majo, junio, julio/aŭgusto, septembro kaj oktobro.*

---

planoj por grandioza Eŭropa Junulara Konferenco en Enkhuizen, dum la Somero 1967; pri ĉio la NEJ-bulteno daŭre informas.

Neeltje Boersma. Wim Janssen.

## LA U.E.A.-PETSKRIBO AL UNO.

Delegacio de Universala Esperanto-Asocio, gvidita de prof. Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, je la 6-a de oktobro transdonis al la sub-sekretario de UNO, s-ro C. V. Narasimhan, proponon por la solvo de la lingva problemo.
La proponon entute subskribis 919 895 personoj el 74 landoj. Inter la subskribintoj troviĝas multaj ŝtatestroj kaj membroj de registaroj, parlamentanoj, lingvistoj kaj filologoj, Nobelpremiitoj, membroj de sciencaj akademioj, institutoj kaj profesoroj de universitatoj, verkistoj, artistoj, ĵurnalistoj kaj instruistoj.
Krome la proponon apogas 3840 organizaĵoj kun entute pli ol 70 milionoj da membroj.
(parte laŭ „Nieuw Rotterdamse Courant" de 8 oktobro 1966-a).

## ĈEFESTRARO DE L.E.E.N.

| | |
|---|---|
| Prezidanto | S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, 's-Gravenhage. tel.: 070-542186. |
| Sekretariino | S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage. tel.: 070-669669. |
| Kasistino | S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid. tel.: 02560-7615. Poŝtĝirkonto 34563 je la nomo de la asocio. |
| | S-ro B. R. Beekhuysen, Noorsestraat 17, Delfzijl. |
| | S-ro T. Boersma, Borniastraat 95, Leeuwarden. |
| | S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12. tel.: 010-189481. |
| | S-ro J. R. Janssen, Veen en Duin 15, Bloemendaal. tel.: 02500-51120. |
| | S-ro R. Slot, Ernst Casimirlaan 21, Zeist. tel.: 03404-15228. |

## SEKCIOJ DE L.E.E.N. (SEKRETARIEJOJ)

| | |
|---|---|
| Alkmaar | S-ino E. Box-Worp, Marijkelaan 5, Alkmaar. |
| Almelo | F-ino F. B. Rauwerdink, De Savorin Lohmanstraat 30, Almelo |
| Amersfoort | S-ino G. Salomons-Ruardi, St. v.d. Hagenlaan 6, Amersfoort. tel.: 03490-16817 |
| Amsterdam | S-ro W. Zeiss, Anna Bijnsstraat 2 II, Amsterdam-W. |
| Arnhem | S-ro H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. tel.: 08300-26699 |
| Boskoop | S-ro W. Weerheijm, Berkenweg 39, Boskoop. |
| Deventer | S-ino E. Rijsbaarman-Adriaanse, Rembrandtkade 140, Deventer. tel.: 05700-17786 |
| 's-Gravenhage | S-ino I. M. J. Dijkhoff-Lenze, Van Trigtstraat 20, 's-Gravenhage tel.: 070-243923 |
| Groningen | S-ino N.C. Kuiterman-v. Goor, Bosb.Toussaintstr. 21, Groningen |
| Haarlem | S-ino G. J. Rodenhuis-Boll, Ruijs de Perezlaan 2, Aerdenhout. tel.: 02500-41216 |
| Den Helder | S-ro H. de Haan, Abel Tasmanstraat 2, Den Helder. |
| Hilversum | F-ino A. J. Middelkoop, Jonkerweg 11, Hilversum. tel.: 02950-43320 |
| Hoogezand | F-ino B. Kliphuis, Zuiderlaan 52, Hoogezand. Likvidis. |
| Krommenie | S-ino J. v.d. Meulen-v. Harten, Popelstraat 13, Krommenie. |
| Leeuwarden | F-ino Y. Weidema, Goutumerdijk 18, Goutum, post Leeuwarden |
| Leiden | S-ro H. Valkenburg, Hazenboslaan 24, Oegstgeest. tel.: 01710-50458 |
| Rotterdam (Esp-o) | S-ro J. M. J. Driesen, Fortuinstraat 61, Rotterdam-12. tel.: 010-229046 |
| Rotterdam (Merk.) | F-ino J. v.d. Hengel, Willem Nagellaan 16, Rotterdam-13. tel.: 010-185432 |
| Rotterdam (Kat.) | S-ro M. Hannaart, Mathenesserdijk 52 hs., Rotterdam-7. |
| Utrecht | S-ro F. Hoekstra, Prof. Sjollemalaan 24, Utrecht. |
| Zaandam | S-ro J. Vis, P. J. Takstraat 64, Zaandam. |
| Zeist | S-ro J. P. Lootsma, Griffensteijnseplein 42, Zeist. tel.: 03404-16304 |

---

| | |
|---|---|
| Redaktoro „N.E." | H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. tel.: 08300-26699 |
| Administranto | P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. tel.: 04310-3611 |
| Presejo „N.E." | Van Liere, Hoofdstraat 107, Emmen tel.: 05910-1392 |

KUL